

# bulteno

## de Esperantistaj Kluboj Praha kaj Brno

1 – 1995 Periodický zpravodaj esperantských klubů

Letošní 80. světový kongres esperanta se bude konat ve dnech 22. - 29. července v Tampere ve Finsku. Záštitu nad touto významnou událostí přijal prezident republiky Finska, pan Marti Ahtisaari.

**Následující 81. světový esperantský kongres se pak podle rozhodnutí Světové esperantské asociace uskuteční ve dnech 20. - 27. 7. 1996 v Praze.** Počítá se s účastí 3000 osob. Naposled se konal světový kongres esperanta v Praze v roce 1921 pod záštitou tehdejšího ministra zahraničí Dr. Eduarda Beneše. Ve svém pozdravu kongresu tehdy prohlásil: "myšlenku esperanta budu vždy podporovat" - a skutečně ji také podporoval.

**48. kongres IKUE - Mezinárodní katolické esperantské unie - se uskuteční v týdnu od 8. do 15. července 1995 v Olomouci.** Pro tuto událost světového významu je připraven bohatý program - přednášky, zájezdy, kulturní programy atp. Pro zahraniční účastníky jsou dále připraveny převážně turistické doprovodné programy předkongresový v Praze a následný pobyt v Brně. Adresa pořadatelů: Miloslav Šváček, Tršická 6, 751 27 Pěňčice.

**Druhý kongres Evropské esperantské unie se uskuteční v Paříži** v době od 2. - 6. června 1995. Francouzský esperantský svaz pozval do Příže všechny esperantské svazy jednotlivých evropských zemí. Adresa pořadatelů: Esperanto-Eŭropunia Kongreso, 4 bis Rue de Cerisaie, F-75004, Paris.

**Esperantské pořady rakouského Rádio Aŭstria Internacia** můžete poslouchat každou neděli v 18,05 na vlnách 6155 kHz (2 m). Výpravny barevný prospekt obdrží každý žadatel na adrese: RAI, A-1136 Wien.

**Estonský rozhlas zastavil svá vysílání v cizích jazycích kromě esperanta.** Esperantské vysílání můžete poslouchat každý čtvrtek - UT 5925 kHz (50,6 m).

**K Všem členům a přátelům brněnského Klubu esperantistů se zármutkem oznamujeme, že dne 25. prosince 1994 zemřel náhle ve věku 75 let dlouholetý člen Klubu esperantistů, obětavý a nadšený propagátor esperanta, pan Arnošt Balaš. Zůstane navždy v našich vzpomínkách.**

### LA KOTIZOJ EN 1995 POR ĈEA:

#### 20,- aliĝpago por novaj membroj

- A: 120,- perlaborantaj personoj; 20,- nevidantoj
- B: 60,- pensiuloj, studentoj, soldat-servantoj, virinoj hejme mastrumantaj, invalidoj, senlaboruloj
- C: 300,- subtenantoj de Esperanto
- D: 30,- familianoj
- E: 30,- amikoj de Esperanto (neesperantistoj)

## LA KOTIZOJ POR KLUBOJ:

### en Prago:

- I. 50,- ĉiuj perlaborantaj personoj, ankaŭ familianoj ktp.
- II. 30,- pensiuloj ĝis 70-jaraj kaj ĉiuj ceteraj laŭ la asocia kategorio B
- III. 10,- pensiuloj super 70 jaroj

### en Brno:

- I. 40,- ĉiuj laŭ la asociaj kategorioj A ĝis C
- II. 30,- ĉiuj ceteraj

## Donacoj, krompagoj kaj subtenoj estas bonvenaj!

Dovolená 1995 na Letním esperantském táboře v Lančově!  
Jazykové kurzy esperanta, angličtiny, němčiny a francouzštiny.

1. běh od 2. 7. do 15. 7. 1995
2. běh od 16. 7. do 29. 7. 1995
3. běh od 30. 7. do 12. 8. 1995

Cena pro účastníky  
do 15 let 2.080,- Kč,  
pro ostatní 2.280,- Kč.

Adresa:  
Esperanto  
674 01 Třebíč

Denně 4 hodiny výuky jazyku a 1 hodina zpěvu, koupání, výlety, táboráky. Na místě je možno zakoupit zájezd do Vídně.

V centru Českého ráje, mezi lesy a rybníky, dvě stanice od Trutnova (zastávka Loukov) vznikl hotel - penzion "ESPERO" vedený MUDr. Josefem Hradilem, lékařem v Mnichově Hradišti. Nabízejí se masáže, perličkové a přísadové koupele. Penzion má moderní kuchyni, klubovny, video, bar, stolní tenis. Jedinečné podmínky pro turistiku. Ubytovací kapacita je 60 lůžek. Plná denní penze (3x denně strava) a cena za ubytování činí 195,- Kč. Adresa: MUDr. Josef Hradil, 295 01 Mnichovo Hradiště 1161.

<b>La kunvenqj de la Esperantista Klubo en Praha EN LA 1-A JARKVARONO 1995</b>
--

### Januaro

- |     |                                     |                  |
|-----|-------------------------------------|------------------|
| 2.  | La Esperanta gramatiko "en kubo"    | - Seemannová     |
| 9.  | F. V. Lorenz - la duobla pioniro I. | - Mařík          |
| 16. | Korea vespero                       | - ges-roj Chrdle |
| 23. | Jubileoj en la j. 1995              | - Patera         |
| 30. | Libera tribuno                      |                  |

### Februaro

- |     |                                    |              |
|-----|------------------------------------|--------------|
| 6.  | La Esperanta gramatiko "en kubo"   | - Seemannová |
| 13. | F.V.Lorenz - la duobla pioniro II. | - Mařík      |
| 20. | Jarkunveno                         |              |
| 27. | Popolaj kantoj en Esperanto        | - Patera     |

## Marto

- |     |                                  |               |
|-----|----------------------------------|---------------|
| 6.  | La Esperanta gramatiko "en kubo" | - Seemannová  |
| 13. | Neeŭropaj vortoj en Esperanto    | - Patera      |
| 20. | La naturo kuracas                | - ing. Pluhař |
| 27. | Libera tribuno                   |               |

La kunvenoj de la klubo okazas ĉiulunde inter la 18.00 kaj 20.00 h en la Klubo de pensiuloj en Praha-Smíchov, Nádražní ul. 52. Inter la 17.00 kaj 19.00 h okazas tie konversacia kurso de Ing. Blažková.

**Přijímáme přihlášky do konverzačního kroužku (á 12 účastníků) jednou měsíčně vždy první pondělí od 17. do 19. hod., cena 25 Kč za 1 vyučovací hodinu měsíčně. Přihlášky zašlete korespondenčním lístkem na adresu: Ing. Jaroslav Blažková, Bajkonurská 736, 149 00 Praha 4 - Háje.**

*MARTA KŘENKOVÁ, nia membrino, kuŝas dum monatoj, soleca kaj nekapabla movi sin, kun rompitaĵ kruro kaj brako. en **Rehabilitační ústav, čambro 520, Kladruby ap. Vlašim, PSČ: 257 62.** En la hospitalo en Praha-Motol, estante malzorge flegata kaj proksimiĝante al morto, ŝi vidis antaŭ si (jam konatan) „tunelon“ plenan de agrabla lumobriilo kaj senpeziĝo. - Kontraste: en Kladruby ŝi sentas sin „kvazaŭ en svisa sanatorio“. - Ŝi sopiras ricevadi komunikaĵojn de amikoj (tiuĵ jam venas, ankaŭ el eksterlando). Persone vizitis ŝin berlinano kaj s-ino Gode el Germanio kaj el EK Praha s-ano Šperling.*

*Marta lernis Esperanton antaŭ 40 jaroj en Somera lernejo en Rožnov p.R. kun (i.a.) junulo Miloslav Vlk el Č. Budějovice, kiun ĉiuj alparolis „ci“. Kiu imagus tiam, ke tiu studento fariĝos iam estonte ĉefepiskopo, kaj eĉ kardinalo!*

(jm)

<p style="text-align: center;"><b>La kunvenoj de la Esperantista Klubo en Brno EN LA 1-A JARKVARONO 1995</b></p>
--

## Januaro

- |     |  |                   |
|-----|--|-------------------|
| 4.  | Novjara saluto kaj perspektivoj de nia movado      | - mgr. Z. Hršel   |
| 11. | Iom malsupra ol anĝelo (A. Balaš †)                | - J. Vondroušek   |
| 18. | <b>Jarkunveno</b>                                  |                   |
| 25. | Rabindranath Tagore - filozofo de l' harmonia vivo | - RNDr. J. Šíkula |

## Februaro

- |     |                                 |   |
|-----|---------------------------------|---|
| 1.  | Ĝibran Ĥalil Ĝibran: La Profeto | - Ing. K. Daněk                         |
| 8.  | Mikelaĝelo Buonaroti            | - M. Malovec                            |
| 15. | La vivo de efemero              | - RNDr. E. Wohlgemuth                   |
| 22. | A. P. Ĉehov kaj lia Urso        | - M. Lorková, M. Malovec, Ing. K. Daněk |

## Marto

- |     |   |                             |
|-----|---|-----------------------------|
| 1.  | Libera tribuno - ĉiu prezentu ian rememoron, okazajon aŭ epizodon |                             |
| 8.  | Ĉu astrologio estas scienco?                                      | - L. Rýznar, Svitavy        |
| 15. | TGM   | - J. Vondroušek             |
| 22. | Miaj Esperanto-kantoj   | - L. Huf, Ivanovice na Hané |
| 29. | Nocioj apartenantaj al la tuta mondo                              | - J. Vondroušek             |

Klub esperantistů v Brně se nadále schází každou středu od 19.00 v místnosti městského úřadu (místnost klubu důchodců) na Starobrněnské ulici č. 15.

**Před každým klubovým pořadem se vždy od 17.00 do 18.30 koná kurz esperanta pro začátečníky a od 18.30 do 19.30 kurz pro pokročilé, které vede mgr. Z. Hršel.**

**ĈEFEPISKOPO CELEBRIS MESON EN ESPERANTO** dum renkontiĝo de katolikaj esperantistoj el Ĉeĥio, Pollando kaj Germanio 7. - 9. 10. 1994 en Praha-Kunratice. La sanktan meson celebris en Esperanto la praga ĉefepiskopo Miloslav Vlk, kiu patronas agadon de la ĉeĥaj katolikaj esperantistoj. D-ro Vlk diris i.a., ke la esperantistoj celas ne nur venki la lingvajn barojn, sed ankaŭ interproksimigi la homojn. Tio tre gravas dum la nuna ega malriĉo de rilatoj. (Laŭ Šváček en la gazeto „Světlo“.)

*Aldono de J. Mařík:* M. Vlk fariĝis antaŭ 40 jaroj instruistan ekzamenon pri E-o kaj eĉ aktivis kiel estro de esperantista junularo en Ĉ. Budějovice. La 31-an de oktobro li estis en Vatikano promociita je kardinalo.

**Standon n-ro 230 aranĝis inter 300 neŝtataj senprofitaj organizaĵoj en la ekspozicio „Homoj al homoj“** (1. - 3. 12. 1994) Asocio de Esperantistoj Handikapuloj, kun helpo de EK Pardubice, en Praha. S-ino H. Maudrová kaj poste J. Mařík sukcesis iomete alparoli tie, ekster la Stando, la ministron de kulturo Tigrid.

(J.Mařík)

## **BIBLIAJ RAKONTOJ**

### **Kain kaj Habel**

Kaj Adam ekkonis Evan, sian edzinon, kaj ŝi gravediĝis, kaj ŝi naskis Kainon; kaj ŝi diris: „Mi akiris homon de la Eternulo.“ Kaj plue ŝi naskis lian fraton Habel. Kaj Habel fariĝis ŝafpaŝtisto, kaj Kain fariĝis terlaboristo.

Kaj post ia tempo fariĝis, ke Kain alportis el la fruktoj de la tero donac-oferojn al la Eternulo. Kaj Habel ankaŭ alportis el la unuenaskitoj de siaj ŝafoj kaj el ilia graso. Kaj la Eternulo atentis Habelon kaj lian donacoferon; sed Kainon kaj lian donacoferon Li ne atentis.

Kaj Kain tre ekkoleris, kaj lia vizaĝo kliniĝis. Kaj la Eternulo diris al Kain: „Kial vi koleras? kaj kial kliniĝis via vizaĝo? Ja se vi agos bone, vi estos forta; sed se vi agos malbone, la peko kuŝos ĉe la pordo, kaj vin ĝi aspiros, sed vi regu super ĝi.“

Kaj Kain parolis kun sia frato Habel; kaj kiam ili estis sur la kampo, Kain leviĝis kontraŭ sian fraton Habel kaj mortigis lin. Kaj la Eternulo diris al Kain:

„Kie estas via frato Habel?“ Kaj tiu diris: „Mi ne scias; ĉu mi estas gardisto de mia frato?“

Kaj Li diris: „Kion vi faris? la voĉo de la sango de via frato krias al Mi de la tero. Kaj nun estu malbenita de sur la tero, kiu malfermis sian buŝon, por preni la sangon de via frato el via mano. Kiam vi prilaboros la teron, ĝi ne plu donos al vi sian forton; vaganto kaj forkuranto vi estos sur la tero.“

Kaj Kain diris al la Eternulo: „Pli granda estas mia puno, ol kiom mi povos elporti. Jen Vi forpelas min hodiaŭ de sur la tero, kaj mi devas min kaŝi antaŭ Via vizaĝo, kaj mi estos vaganto kaj forkuranto sur la tero, kaj iu ajn, kiu min renkontos, mortigos min.“

Kaj la Eternulo diris al li: „Sciu, ke al iu, kiu mortigos Kainon, estos venĝite sepoble.“ Kaj la Eternulo faris sur Kain signon, por ke ne mortigu lin iu, kiu lin renkontos.

Kaj Kain foriris de antaŭ la Eternulo, kaj loĝiĝis en la lando Nod, oriente de Eden. Kaj Kain ekkonis sian edzinon, kaj ŝi gravediĝis, kaj ŝi naskis Hanohon. Kaj li konstruis urbon, kaj donis al la urbo nomon laŭ la nomo de sia filo: Hanoh.

Kaj denove Adam ekkonis sian edzinon, kaj ŝi naskis filon, kaj donis al li nomon Set: „Ĉar Dio metis al mi alian semon anstataŭ Habel, kiun mortigis Kain.“

## Pri la diluvo

Kaj kiam la homoj komencis multiĝi sur la tero kaj al ili naskiĝis filinoj, tiam la filoj de Dio vidis la filinojn de la homoj, ke ili estas belaj; kaj ili prenis al si edzinojn el ĉiuj, kiujn ili elektis.

Kaj la Eternulo diris: „Ne regos Mia spirito inter la homoj eterne, pro iliaj pekoj, ĉar ili estas karno; ilia vivo estu cent dudek jaroj.”

Gigantoj estis sur la tero en tiu tempo, eĉ post kiam la filoj de Dio venis al la filinoj de la homoj kaj ĉi tiuj naskis al ili. Tio estis fortuloj, tre famaj de plej antikva tempo. Kaj la Eternulo vidis, ke granda estas la malbono de la homoj sur la tero kaj ke ĉiuj pensoj kaj intencoj de iliaj koroj estas nur malbono en ĉiu tempo; tiam la Eternulo pentis, ke Li kreis la homon sur la tero, kaj Li afliktiĝis en Sia koro.

Kaj la Eternulo diris: „Mi ekstermos de sur la tero la homon, kiun Mi kreis, de la homo ĝis la brutoj, ĝis la rampaĵoj, kaj ĝis la birdoj de la ĉielo; ĉar Mi pentas, ke Mi ilin kreis.”

Sed Noa akiris plaĉon en la okuloj de la Eternulo. Noa estis homo virta kaj senmakula en sia generacio; kun Dio Noa iradis. Kaj naskiĝis al Noa tri filoj: Ŝem, Ham, kaj Jafet.

Kaj la tero malvirtiĝis antaŭ Dio, kaj la tero pleniĝis de maljustaĵoj. Kaj Dio vidis la teron, ke ĝi malvirtiĝis, ĉar ĉiu karno malvirtigis sian vojon sur la tero.

Kaj Dio diris al Noa: „La fino de ĉiu karno venis antaŭ Min, ĉar la tero pleniĝis de maljustaĵoj per ili, kaj jen Mi pereigos ilin kun la tero.

Faru al vi arkeon el ligno gofera; apartaĵojn faru en la arkeo, kaj ŝmiru ĝin per peĉo interne kaj ekstere. Kaj faru ĝin tiamaniere: tricent ulnoj estu la longo de la arkeo, kvindek ulnoj ĝia largo, kaj tridek ulnoj ĝia alto. Fenestron faru en la arkeo supre, kun la alto de unu ulno, kaj la pordon de la arkeo vi faros en la flanko; malsupran spacon, duan spacon, kaj trian spacon faru en ĝi.

Kaj jen Mi venigos akvan diluvon sur la teron, por ekstermi ĉiun kamon, kiu havas en si spiriton de vivo sub la ĉielo; ĉio, kio estas sur la tero, pereos.

Kaj Mi starigos Mian interligon kun vi; kaj vi eniros en la arkeon, vi kaj viaj filoj kaj via edzino kaj la edzinoj de viaj filoj kune kun vi. Kaj el ĉiuj vivaĵoj, el ĉiu karno, enkonduku po unu paro el ĉiuj en la arkeon, por ke ili restu vivaj kun vi; virbesto kaj virinbesto ili estu. El la birdoj laŭ iliaj specoj, kaj el la brutoj laŭ iliaj specoj, el ĉiuj rampaĵoj de la tero laŭ iliaj specoj, po paro el ĉiuj eniru kun vi, por esti vivaj. Kaj vi prenu al vi el ĉiuj manĝaĵoj, kiuj estas manĝataj, kaj kolektu al vi; kaj ĝi estu por vi kaj por ili por manĝi.”

Kaj Noa tion faris; ĉion, kiel Dio al li ordonis, tiel li faris.

Kaj la Eternulo diris al Noa: „Eniru vi kaj via tuta familio en la arkeon, ĉar vin Mi vidis, ke vi estas virtulo antaŭ Mi en ĉi tiu generacio. El ĉiuj brutoj puraj prenu al vi po sep paroj, virbestojn kaj iliajn inojn; kaj el la brutoj, kiuj ne estas puraj, po du, virbeston kaj ĝian inon. Ankaŭ el la birdoj de la ĉielo po sep paroj, virbestojn kaj virinbestojn, por ke semo restu sur la tuta tero. Ĉar post sep tagoj Mi pluvigos sur la teron dum kvardek tagoj kaj kvardek noktoj, kaj Mi ekstermos de sur la tero ĉiujn ekzistaĵojn, kiujn Mi kreis.”

Kaj Noa faris ĉion, kion la Eternulo al li ordonis.

Kaj Noa havis la aĝon de sescent jaroj, kiam la akva diluvo venis sur la teron. Kaj eniris Noa kaj liaj filoj kaj lia edzino kaj la edzinoj de liaj filoj kune kun li en la arkeon, pro la akvo de la diluvo. El la brutoj puraj, kaj el la brutoj, kiuj ne estas puraj, kaj el la birdoj, kaj el ĉiuj rampaĵoj sur la tero, po paro venis al Noa en la arkeon, virbesto kaj ino, kiel Dio ordonis al Noa.

Kaj kiam pasis la sep tagoj, la diluva akvo venis sur la teron. En la sescenta jaro de la vivo de Noa, en la dua monato, en la dek-sepa tago de la monato, en tiu tago disfendiĝis ĉiuj fontoj de la granda abismo kaj la aperturoj de la ĉielo malfermiĝis. Kaj estis diluvo sur la tero dum kvardek tagoj kaj kvardek noktoj. Ĝuste en tiu tago eniris en la arkeon Noa, kaj Ŝem kaj Ham kaj Jafet, la filoj de Noa, kaj la edzino de Noa, kaj la tri edzinoj de liaj filoj kune kun li; ili, kaj ĉiuj bestoj laŭ siaj specoj, kaj ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero, laŭ siaj specoj, kaj ĉiuj flugaĵoj laŭ siaj specoj, ĉiuj birdoj, ĉiuj flugilhavantoj. Kaj eniris al Noa en la arkeon po du el ĉiu karno, kiu havas en si spiriton de vivo. Kaj la venintoj, virbesto kaj ino el ĉiu karno, eniris, kiel ordonis al ili Dio; kaj la Eternulo fermis post ili.

